



Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 34 (kvara serio), numero 1 (130), 2025
ISSN 1385-2191

Eldonas

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)
interlingvistiko.net ♦ [@CED_interling](https://twitter.com/CED_interling)

Redaktas

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ) 
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

| | | |
|------------|---|-----------|
| I | Eventoj | 3 |
| 1 | La 21-a Internacia kongreso de lingvistoj (ICL), Laborgrupo interlingvistiko, 2024-09-8/14 | 3 |
| 2 | Simpozio: «La akcepto de esperanto en Japanio: rilate al lepro» en 国際基督教大学 (Internacia kristana universitato), Tokio, 2024-11-02 | 3 |
| 2.1 | Organizantoj | 3 |
| 2.2 | Loko | 3 |
| 2.3 | Temo | 3 |
| 2.4 | Priskribo | 3 |
| 2.5 | Programo | 4 |
| 3 | Inaŭguro de la retejo pri la kolekto Péraire, 2024-11-04 | 4 |
| 3.1 | Loko | 4 |
| 3.2 | Priskribo | 4 |
| 3.3 | Programo | 5 |
| 4 | ILEI (Internacia ligo de esperanto-instruistoj) festis sian 75-jariĝon rete, 2024-12-15 | 6 |
| 5 | Kunveno por festi la 50-an datrevenon de la Esperanto-kolekto ĉe la Universitata biblioteko de Katolicki Uniwersytet Lubelski Jana Pawła II en Lublin, Pollando, 2024-12-18 | 6 |
| II | Universitata kaj esplora agado | 7 |
| 1 | La Esperanto-fako ĉe 枣庄学院 (Zaozhuang-a universitato) | 7 |
| 2 | Esperanto-kursoj ĉe Uniwersytet Jagielloński en Krakovo | 8 |
| III | Kulturo | 10 |
| 1 | Planlingve rilataj ekspozicioj en gravaj kulturinstitucioj | 10 |
| 2 | La televida kanalo <i>Arte</i> mencias en programo pri la mikroŝtato «Moresnet» la rolon luditan de esperanto tie | 11 |

| | | |
|-----------|--|-----------|
| IV | Personoj | 12 |
| 1 | 田中克彦 [TANAKA Kacuhiko] 90-jariĝis, 2024-06-03 | 12 |
| V | Bibliografiaĵoj | 13 |
| 1 | Disertacioj kaj diplomlaboraĵoj | 13 |
| 2 | Fakrevuaj artikoloj | 13 |
| 3 | Libroj | 14 |
| 4 | Libroĉapitroj | 15 |
| 5 | Revu-numeroj | 15 |
| 5.1 | Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik | 15 |
| 5.2 | Language Problems and Language Planning | 15 |
| 5.3 | Beletra Almanako | 15 |
| 5.3.1 | Beletra Almanako, 50, junio 2024. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325. | 15 |
| 5.3.1.1 | Enhavo | 15 |
| 5.4 | Esperantologio / Esperanto Studies | 16 |
| 5.5 | Investigationes Linguisticae | 16 |
| 6 | Novaĵleteroj | 16 |
| 6.1 | Global coalition for language rights (GCLR) | 16 |

I EVENTOJ

1 LA 21-A INTERNACIA KONGRESO DE LINGVISTOJ (ICL), LABORGRUPO INTERLINGVISTIKO, 2024-09-8/14

La raporto pri la laborgrupo interlingvistiko nun troviĝas surrete en la [retejo](#) de Comité international permanent des linguistes/Permanent international committee of linguists (CIPL).

2 SIMPOZIO: «LA AKCEPTO DE ESPERANTO EN JAPANIO: RILATE AL LEPRO» EN 国際基督教大学 (INTERNACIA KRISTANA UNIVERSITATO), TOKIO, 2024-11-02

2.1 Organizantoj

Instituto pri studoj de Aziaj kulturoj. 国際基督教大学 (Internacia kristana universitato)

2.2 Loko

国際基督教大学 (Internacia kristana universitato) en Mitaka, Tokio

2.3 Temo

La akcepto de esperanto en Japanio: rilate al lepro

2.4 Priskribo

En la 2-a de novembro okazis simpozio kun la ĉeftemo «La akcepto de esperanto en Japanio: rilate al lepro». Fakte ĉi tio estas la duafoja evento kun la simila karaktero: la unua okazis en la 12-a de novembro 2022 en la sama loko kun la temo «La akcepto de esperanto en Japanio», sub la iniciato de profesoro SONOYAMA Senri, ne-esperantisto. Li longe instruis (kaj ankoraŭrete instruadas) japanan literaturon en Uniwersytet Jagielloński en Krakovo (Pollando), kaj revenis al Japanio en 2021 akirinte profesoran postenon en la Internacia kristana universitato.

Interesite de la fakto, ke pluraj pecoj el pola literaturo estis tradukitaj japanen pere de esperantaj tradukoj en la unua duono de la 20-a jarcento, profesoro Sonoyama projektis koncernan simpozion invitante kiel ĉefpreleganton GOTOO Hitosi, nun emerita profesoro de la 東北大学 (Universitato Tohoku) en Sendai (Japanio).

Gotoo, en la prelego titolita «La akcepto de esperanto en Japanio – traktante kelkajn temojn» substrekis la rolon de esperanto kiel la literatura pontolingvo inter la japana kaj negrandaj lingvoj en Eŭropo kiel la pola kaj la sveda, kaj Sonoyama pritraktis «Pri Onna no Unmei, la japana

traduko de Marta, novelo de pola verkisto Orzeszkowa». La simpozio estis sukcesa, kun partopreno (reala kaj reta sume) de 66 personoj. Jen estis la motivo de profesoro Sonoyama refoje okazigi similan simpozion. La ĉi-foja simpozio tiel okazis en pligrandigita formato kun kvar prelegantoj, fokusiĝante al la esperanto-movado en rilato al la temo de lepro.

La simpozio okazis reale kaj rete kaj havis sume 55 partoprenantojn. La organizanto taksas tion sukcesa kaj laŭdire projektas okazigi trian esperanto-rilatan simpozion post 2 jaroj.

GOTOO Hitosi

2.5 Programo

- GOTOO Hitosi: Esperanto kaj lepro en Japanio
- KIMURA Goro Christoph: Multflankeco de ISIGA Osamu – Kio kunligas kristanismon, esperanton, literaturan tradukadon, militrifuzon kaj flegadon de lepruloj?
- ITO Hiroki: Simbola imago de Musasino en leprula literaturo, kun la fokuso al la utaaro «Sinonome no Mabuta» de Utaa grupo de Musasino
- SONOYAMA Senri: Legi la japanan tradukon de «La fundo de l'mizero» fare de KUROKAWA Hitomi

3 INAŬGURO DE LA RETEJO PRI LA KOLEKTO PÉRAIRE, 2024-11-04

3.1 Loko

EHESS, 54 bld Raspail, 75006 Paris

3.2 Priskribo

Dek jarojn post la Unua mondmilito Lucien Péraire, juna esperantisto laborulo, plenumis eksterordinaran vojaĝon tra Eŭropo, Sovetunio, Manĉurio, Japanio, Suda Ĉinio, Indoĉinio kaj Indonezio. La ekvojaĝon spronis la deziro «kompreni la kialojn de militoj» kaj ankaŭ elprovi la transnacion kaj tutmondan esperantistan komunumon, alternativon al konfliktoj inter nacioj kaj gentoj.

Lia rakonto restis malkonata ĝis antaŭ nelonge kiam troviĝis plurmilera kolekto en la arkiivejo de la asocio Esperanto-France, konservita en netaŭgaj kondiĉoj. Tiu malaperanta heredaĵo hodiaŭ saviĝas per cifereca rimedo kaj estas disponigita por esploristoj kaj interesiĝantoj dank'al la laboro de teamo kunigita de Centre Alexandre Koyré, kadre de projekto financita de Pariza regiono.

La oklingva retejo [L'Eurasie à vélo](#) de nun prezentiĝas kiel referenco kie alireblas ĉiuj dokumentoj konservitaj kiujn Péraire deziris publikigi: la diversajn versiojn de la rakonto (stenografian, francan kaj esperantan), fotojn, bildkartojn, geografiajn mapojn, teksaĵojn, korespondaĵojn.

broŝurojn kiuj dokumentas unu el la lastaj vojaĝoj, kiuj ankoraŭ eblas antaŭ ol kreskantaj totalismaj reĝimoj kaj la Dua mondmilito fermas multajn landojn de la mondon kaj forte malhelpas interlandajn vojaĝojn.

La retejo ofertas diversajn serĉilojn : ĉu tekstajn (traserĉo en aŭtomate transskribitaj manskribaĵoj kaj en transskribitaj stenografiaj kajeroj), ĉu geografiajn, dank'al kompleta listo de identigitaj loknomoj, koordinate biritaj. Ĝenerala inventaro faciligas orientiĝon tra la korpuso. Altkvalitaj ciferecaj kopioj estis alŝutitaj al la [cifereca dokumentujo nakala](#).

Pascal Dubourg Glatigny

3.3 Programo

- Ouverture (malfermo)
 - Anne Rasmussen, *Centre Alexandre Koyré*
 - Isabelle Rouget, *MNHN, CR2P, DIM PAMIR*
 - Xavier Godivier, *Espéranto-France*
- Le voyage de Lucien Péraire dans le nuage numérique (La vojaĝo de Lucien Péraire en la cifera nuboj)
 - Pascal Dubourg Glatigny, *CNRS, Centre Alexandre Koyré*
- La fabrique de l'équipement (La ekpaĵefabriko)
 - Régis Fournier
 - Gilles Pérez
 - Nicolas Raymond
- Des usages à venir : linguistique et littérature (Estontaj uzoj: linvistiko kaj literaturo)
 - Philippe Planchon, *Université de Tours*
 - Marjorie Berthomier, *Université Paris Cité*
 - Coraline Jortay, *CNRS, THALIM*
- Des usages à venir : histoire et géographie (Estontaj uzoj: historio kaj geografio)
 - Jade Nguyen, *Aix-Marseille Université*
 - Catherine Gousseff, *CNRS, CERCEC*
 - Ivan Sevchuk, *Géographie-Cités*
- Des usages à venir, études visuelles et anthropologie (Estontaj uzoj: vidaj studoj kaj antropologio)
 - Jean-Marc Besse, *CNRS-EHESS*
 - Christian Joschke, *Beaux-Arts de Paris*
 - Liliana Lopez, *CUBIC, Barcelone*

4 ILEI (INTERNACIA LIGO DE ESPERANTO-INSTRUISTOJ) FESTIS SIAN 75-JARIĜON RETE, 2024-12-15

Per legado de la teatraĵo «1910» kaj la rondiranta rakonto «Pri viroj kaj kunikloj» ILEI malfermis la [feston pro sia 75-jariĝo dum la Zamenhofa tago](#). Oni ankaŭ kunlabore kun TEJO (Tutmonda esperanta junulara organizo) iniciatis konkurson «La Instruistoj de la Jaro».


5 KUNVENO POR FESTI LA 50-AN DATREVENON DE LA ESPERANTO-KOLEKTO ĈE LA UNIVERSITATA BIBLIOTEKO DE KATOLICKI UNIWERSYTET LUBELSKI JANA PAWŁA II EN LUBLIN, POLLANDO, 2024-12-18

La Esperanto-kolekto en Lublin estas la plej granda pola esperanto-biblioteko. Ĝi fondiĝis 1974-10-24 kaj estas fako de la universitata biblioteko de la fama Katolicki Uniwersytet Lubelski Jana Pawła II. Dum la kunveno en la universitato oni aŭskoltis kvin prelegojn kaj samtempe festis la 165-an naskiĝtagon de Zamenhof.

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 LA ESPERANTO-FAKO ĈE 枣庄学院 (ZAOZHUANG-A UNIVERSITATO)

Zaozhuang-a Universitato en la samnoma urbo de Shandong-provinco de Ĉinio havas nuntempe la solan Esperanto-fakon oficiale rekonatan fare de la Ĉina registaro. Tiu rekono, al kiu laboris dum longa tempo multaj esperantistoj, subtenataj de la estroj de la universitato mem kaj de Ĉina esperanto-ligo, igas ĝin tre speciala en la ĉina panoramo kaj iel modelo por aliaj pli mallongaj kursoj instruataj aliloke. La origino de la fako ŝuldiĝas al intuicio de Sun Mingxiao (Semio), kiu estas ankaŭ je la origino de la Esperanto-muzeo de Zaozhuang-a Universitato, fondita en 2013. Fakte, la antaŭa kreado de la muzeo estis gravega por persvadi lokajn, provincajn kaj naciajn administrantojn pri la valoro de Esperanto kiel lingvo, kiu ludis gravan rolon en la ĉina historio kaj kiu proponas idealon de paco. Same gravis la junuloj, kiuj aktivis en la konstruado de la muzeo, kaj kiuj motivigis per siaj ekzemploj la unuajn studentojn de la fako. Krome, per esperanto Zaozhuang-a Universitato kapablis altiri kaj dungi doktoriĝintajn instruistojn el Italio, Japanio, Koreio kaj Pollando, kio donis prestiĝon al la fako ene de la universitato mem. Precipe profesoro Sasaki Teruhiro el Japanio lasis grandan impreson ne nur per sia varma amo al instruado, sed ankaŭ pro sia esperantigo de pluraj verkoj de antikvaj ĉinaj filozofoj, tre gravaj en urbo proksima de la naskiĝloko de Konfuceo kaj en kiu Mozio verkis parton de sia libro. Same grava estas profesoro Bak Giwan el Koreio, kiu laboris en Zaozhuang dum multe da jaroj kaj ankoraŭ instruas al la studentoj interrete, helpante ilin funde kompreni kaj regi la gramatikon de



ILUSTRADO 1.1 Alessandra Madella intruante en 枣庄学院, Zaozhuang

Esperanto.

La nunaj studentoj estas la tria grupo varbita por la fako kaj ili estas nun en sia tria jaro. Ili bakalaŭriĝos en la printempa semestro de 2026. Krom la ĝeneralaj kursoj, kiujn vizitadas ĉiuj studentoj en ĉinaj universitatoj, kiel ekzemple Marksisma penso, ili havas sufiĉe multe da lecionoj de la angla fare de ĉinaj instruistoj. En la du unuaj jaroj ili lernis la bazan gramatikon de esperanto kaj komencis sin esprimi en la lingvo. Mi uzis kun ili la lernolibron de Stano Marĉek kaj la tutan video-kurson «Pasporto al la tuta mondo». Ĉi-jare ili havas progresintajn lingvo-lecionojn kun Choi Manwon el Koreio, doktoriĝinta pri Marxisma penso en ĉina universitato, sed ili estas ankaŭ profundigantaj siajn tradukajn kapablojn, dank'al Long Yunxia, juna instruistino magistriĝinta pri Esperantologio kaj Interlingvistiko en Poznano. Grava ekzerco ĉirilate estis la ĉinigo de la libro *La ĉiutaga vivo kiel historio: Sen timoj kaj sen psikiatrio* de la itala kuracisto Antonietta Bernardoni. Mi instruas al ili esperantan literaturon kaj esperantan ĵurnalismen. Por la studentoj estas certe granda salto kompare kun la ĝisnuna lernado, sed ili volonte partoprenas en diskutoj pri literaturaj tekstoj aŭ pri la ŝanĝanta mondo de komunikiloj en la tempo de konverĝo. Kaj ili ŝatas analizi esperantajn revuojn kaj verki artikolojn por ili. Venontan semestron mi instruos al ili interkulturan komunikadon, kiu ne estis origine en ilia stud-plano, sed kiun mi jam instruis dum pluraj semestroj al la studentoj de la angla fako.

La studentoj multe ŝatas aktivi, ne nur en la Studenta esperanto-klubo, sed ankaŭ en aliaj formoj de varbado por esperanto, kiel la organizado de lecionoj por volontuloj. Kelkaj ankaŭ aktivas alimaniere, kiel en la Studenta sindikato aŭ rilate al la universitata virina korbopilka teamo. Pro la timo de la gepatroj, ke filoj ne trovos laboron post diplomiĝo, ĉi-fojon la studentoj estas relative malmultaj. La sento fari ion specialan ebligis ilin disvolvi tre fortajn ligojn de amikeco. Mi klopodis organizi korespondadon kun italaj, japanaj, koreaj kaj rusaj samideanoj, plejeble junuloj. Kaj kelkaj studentoj jam havis la eblon partopreni en landaj kaj internaciaj kongresoj aŭ renkontiĝoj de esperanto, kio profundigis ilian intereson pri la lingvo. Eble la malfermo de esperanto-kursoj en aliaj ĉinaj universitatoj povos porti al kelkaj el ili dungeblecon, same kiel la pligrandiĝo de la Esperanto-muzeo en Zaozhuang-Universitato kaj ties projekto de internacia esperanto-fako. Kelkaj studentoj povus eble havi la ŝancon de ĵurnalisma kariero en la ŝtataj komunikiloj. Tamen verŝajne ne multaj el ili sukcesos trovi laboron rekte rilatan al esperanto. Alternative, kelkaj ŝatus plustudi por iĝi instruistoj de la ĉina, de la angla aŭ pri ĉina kaj monda historio. Sed gravas, ke ĉiuj jam pripensas kreemajn kaj interesajn manierojn daŭre uzi siajn esperantajn konojn en sia estonta studado aŭ laboro, kiu ajn ĝi estos. Kaj precipe ĉiam restos la konscio, ke ilia studado de esperanto vastigis iliajn horizontojn, donante al ili multe da intereso pri aliaj kulturoj kaj la kapablon libere esprimi siajn pensojn kun homoj de la tuta mondo.

Alessandra Madella, 枣庄学院

2 ESPERANTO-KURSOJ ĈE UNIwersYTET Jagielloński EN KRAKOVO

Esperanto estas ĉiujare instruata en Uniwersytet Jagielloński en Krakovo, Pollando, kiel «komerca kurso». Okazas kursoj de esperanto je ĉiuj niveloj. Ĉiujare la universitato anoncas kurson por komencantoj (niveloj A1-A2) kaj laŭtemajn kursojn internaciajn. De minimume 10 jaroj estas regule ofertata enreta baza kurso por ĉiuj poloj, vivantaj en Pollando aŭ eksterlande. En Krakovo

vo, krom ĉeestaj kursoj por komencantoj en Uniwersytet Jagielloński, Maria Majerczak instruis esperanton ankaŭ en du aliaj superaj lernejoj de Krakovo: Akademia Górniczo-Hutnicza im. Stanisława Staszica w Krakowie – AGH (Scienca kaj Teknologia Universitato) kaj, ekde la jaro 2002-a, en Wyższa Szkoła Zarządzania i Bankowości w Krakowie (Altlernejo pri administrado kaj bankado), kies rektoro estas esperantisto.

Ekzistas ĉiujara organizado de enretaj kursoj por komencantoj, pri kiuj, cetere, esperantistoj estas informataj (i.a. per edukado.net). La kurso estas malfermita al plenkreskuloj de ĉiu aĝo. Por aliĝi, oni bv. kontakti [Maria Majerczak](#). La kursenhavojn oni trovas [ĉi tie](#) kaj [ĉi tie](#).



ILUSTRAĴO 1.1 Afiŝo en la *Museo Nacional Centro de Arte Reina Sofía*, Madrid

III KULTURO

1 PLANLINGVE RILATAJ EKSPOZICIEROJ EN GRAVAJ KULTURINSTITUCIOJ

La afiŝo en ilustraĵo 1.1 troviĝas en la grava *Museo Nacional Centro de Arte Reina Sofía* en Madrido en parto de la ekspozicio pri la Eŭropa politiko dum la 1930-aj jaroj. La sama afiŝo estas ankaŭ la sola esperantaĵo en la Domo de europa historio en Bruselo. La redakcio de IpI bonvenigas aliajn ekzemplojn de planlingve rilataj aferoj en gravaj institucioj ekster la esperantomovado.

La redaktoroj

2 LA TELEVIDA KANALO ARTE MENCIAS EN PROGRAMO PRI LA MIKROŜTATO «MORESNET» LA ROLON LUDITAN DE ESPERANTO TIE

La franc-germana televida kanalo Arte prezentis programeton pri la singulara historio de «Moresnet Neutral», mikroŝtato en Eŭropo ekzistanta inter 1816 kaj 1919 ĉe la limoj de Belgio, Germanio, kaj Nederlando. Ĝi formiĝis kiel kompromiso post la Viena kongreso, pro disputo pri la limo kaj riĉa minejo, el kiu eblis eltiri zinkon. La mikroŝtato Moresne Neutral havis francajn leĝojn, neniun specifan impostan sistemon, kaj ĝuis specialan statuson kiel loko sen deviga militservo.

En 1908, esperantistoj provis krei en Moresne Neutral ŝtaton nomatan «Amikejo», celante promocii pacon kaj internacian kunlaboron. Kvankam simbolplena, tiu iniciato ne daŭris, kaj en 1914, kun la komenco de la Unua mondmilito, Germanio aneksis la teritorion. Post la milito, en la Traktato de Versajlo en 1919 la regiono estis formale integrita en Belgio.

Hodiaŭ, la regiono apartenas al la germanlingva komunumo de Belgio kaj konservas sian multkulturan heredaĵon. Spuroj de la Moresne Neutral, kiel antikvaj limŝtonoj kaj muzeoj, restas kiel memorigiloj pri ĝia nekutima historio kaj pacismaj idealoj.

[Vidu la elsendon ĉi tie](#)

IV PERSONOJ

1 田中克彦 [TANAKA KACUHIKO] 90-JARIĜIS, 2024-06-03

En junio 2024 japana socilingvisto kaj honora konsilanto de Japana Esperanto-Instituto, TANAKA Kacuhiko, 90-jariĝis. Rilate esperanton li verkis inter alie la libron «Esperanto: la hereza lingvo» (Tokio: Iwanami, 2007). Okaze de tiu festdato liaj disĉiploj eldonis jenan libron:

ELDONA KOMITATO (編集委員会), redaktoro (2024). 田中克彦先生 90 歳記念文集 (*Festolibro por profesoro Tanaka Kacuhiko okaze de la 90a naskiĝtago*), japana. Tokio.

Tri de la 33 kontribuoj temas pri esperanto:

- 北川郁子 [KITAGAVA Ikuko]: エスペラントの応援者・田中克彦先生への感謝! (Danko al profesoro Tanaka Kacuhiko kiel subtenanto de esperanto!)
- 小川博仁 [OGAWA Hirohito]: 田中克彦に拠るエスペラントの言語類型論について – 〈屈折〉と〈膠着〉をめぐって (Pri tipologio de esperanto laŭ profesoro Tanaka Kacuhiko: Rilate al fleksio kaj aglutino)
- 木村護郎クリストフ [KIMURA Goro Christoph]: なぜ異端の言語なのか 田中克彦のエスペラント論について (Kial esperanto estas hereza lingvo? Pri la teorio de esperanto de Tanaka Kacuhiko)

Reprezenta bibliografio de profesoro Tanaka troviĝas en *Informilo por interlingvistoj*, **18:3 (70)**, 2009: paĝoj 29-30 okaze de lia 75-jariĝo.

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 DISERTACIOJ KAJ DIPLOMLABORAĴOJ

BRAULT, Dylan (2024). «L'espéranto et ses imprévus : étude énonciative du marqueur -um», franca. Magistra laboraĵo. Tours: Université de Tours.

Tiu disertacio celas studi la markon -um en Esperanto laŭ enunciativa aliro, t.e. la Teorio de la Predikativaj kaj Enunciativaj Operacioj de Antoine Culioli. Esperanto estas lingvo kiu proponis Ludoviko Lazaro Zamenhof en 1887. La celo estis la ellaborado de lingvo kiu povus esti uzata por internacie komuniki. Kvankam unuavide la lingvo ŝajnas pli facile lernebla pro la maniero laŭ kiu ĝi estis kreita, ekzistas iuj neregulaĵoj (fakte neatenditaj) kiel la sufikso -um. Tiu sufikso povas esti uzata memstare aŭ lige kun radiko (tiu ĉi dua ebleco estas la plej ofta). Kiam la iniciatinto de la lingvo prezentis tiun sufikson, li difinis ĝin kiel sufikson sen propra signifo, uzeblan kiam aliaj sufiksoj ne taŭgas. Malgraŭ tio, la ambigueco de la sufikso ne malhelpis la Esperanto-parolantojn uzi ĝin por krei novajn vortojn. Ni provas tra pluraj hipotezoj eltrovi la funkciadon de tiu aparta sufikso.

GUÉRIN, David (2024). «Variation ou stabilité dans le fonctionnement des adverbes en espéranto ? une analyse énonciative du marqueur -e», franca. Magistra laboraĵo. Tours: Université de Tours. URL: https://www.applis.univ-tours.fr/scd/Linguistique/Master2/2024LING_M2_Guerin_David.pdf.

Ce mémoire traite des adverbes en espéranto, afin de trouver ce que peut apporter cette langue au statut unique (langue construite devenue langue vivante) à l'étude de cette catégorie débattue. Il se concentre en particulier sur la désinence adverbiale -e. Le principal objectif de cette étude consiste à déterminer s'il est possible de dégager une invariance de fonctionnement qui rend compte de la grande variation syntaxique et sémantique du marqueur -e. Il s'agit également de montrer la productivité de la catégorie et son autonomie en espéranto vis-à-vis des langues sources. Nous décrivons ensuite le fonctionnement de -e dans le cadre de la TOPÉ d'Antoine Culioli, en montrant que les divers emplois peuvent être ramenés à une opération de repérage avec la situation d'énonciation sur un plan qualitatif. Nous nous penchons enfin sur les problèmes posés par l'application apparemment redondante de la désinence -e à des éléments habituellement catégorisés comme des adverbes primitifs.

2 FAKREVUAJ ARTIKOLOJ

GLATIGNY, Pascal Dubourg, redaktoro (2024). «Esperantists in the twentieth century: Making connections in an age of division», angla. En: *Cultural History* 13 2: 103–199.

Enhavo

- Pascal Dubourg Glatigny: Introduction: Esperantists in the twentieth century: Making connections in an age of division

- Ulrich Lins: Two communist esperantists: A Bulgarian-Japanese dialogue
- Edwin Michielsen: Revolutionary tongues: Esperanto, marxist linguistics, and anti-imperial struggles in East Asia, 1930s–1940s
- Pascal Dubourg Glatigny: Facing the choice of language in Esperanto literature: Edwin de Kock, Hasegawa Teru and Julius Balbin between emotion and ideology

3 LIBROJ

BECKMANN, Viola kaj Liliana Ruth FEIERSTEIN, redaktoroj (2023). *Language as hope: L. L. Zamenhof and the dream of a cosmopolitan wor(l)d*, angla. Leipzig: Hentrich & Hentrich.

Enkonduko kaj naŭ artikoloj pri Zamenhof, esperanto kaj judismo

HÅKANSSON, Ola kaj Peter SVENSSON (2024). *På engelska förstår jag ungefär: om anglifieringen av svensk högre utbildning*, sveda. Stockholm: Morfem. ISBN: 9789188419453.

Studo pri la efektoj de la enkonduko de la angla kiel instrulingvo de svedaj universitatoj. Pro la uzo de la ne-naska lingvo de la studentoj kaj instruistoj la kvalito de la instruado kaj rezultoj de la studado suferas.

MADELLA, Alessandra, redaktoro (2024). *Aktoj de simpozioj de ILEI, 2022-2023*, Pisa: Fdistudio. ISBN: 9788870360967. URL: <https://edistudio.it/articolo.php?id=176>.

La volumo en esperanto, kun partoj en la angla kaj en la japana, kolektas eseojn, kiuj kreskis el prelegoj prezentitaj dum la simpozioj de la Tria Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI-3) en 2022 kaj de la hibrida Kongreso en Linjano Orsabla en Italio en 2023. La projekto estas realigita enkadre de la 75-jariĝo de ILEI.

ELDONA KOMITATO (編集委員会), redaktoro (2024). 田中克彦先生 90 歳記念文集 (*Festolibro por profesoro Tanaka Kacuhiko okaze de la 90a naskiĝtago*), japana. Tokio.

Tri de la 33 kontribuoj temas pri esperanto:

- 北川郁子 [KITAGAWA Ikuko]: エスペラントの応援者・田中克彦先生への感謝! (Danko al profesoro Tanaka Kacuhiko kiel subtenanto de esperanto!)
- 小川博仁 [OGAWA Hirohito]: 田中克彦に拠るエスペラントの言語類型論についてー〈屈折〉と〈膠着〉をめぐって (Pri tipologio de esperanto laŭ profesoro Tanaka Kacuhiko: Rilate al fleksio kaj aglutino)
- 木村護郎クリストフ [KIMURA Goro Christoph]: なぜ異端の言語なのか 田中克彦のエスペラント論について (Kial esperanto estas hereza lingvo? Pri la teorio de esperanto de Tanaka Kacuhiko)

4 LIBROĈAPITROJ

5 REVU-NUMEROJ

5.1 *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*

5.2 *Language Problems and Language Planning*

5.3 *Beletra Almanako*

5.3.1 *Beletra Almanako*, 50, junio 2024. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325.

5.3.1.1 *Enhavo*

- Prezento
 - Probal Daŝgupto
- Originala prozo
 - Gunnar Gällmo: Mokrokalvo la gigantegegego
 - Sten Johansson: Televivo
 - Mikaelo Bronŝtejn: Min prenu!
 - Carlo Minnaja: Sopirata renkontiĝo
 - Debra Hamel: La bona najbaro
 - Cho Sung Ho: Tri koncertoj de Khatia
 - Ulrich Becker: Pordoj
- Originala poezio
 - Krys Williams: Oazo
 - Luiza Carol: Balado pri la grafo Trubaduro
- Tradukita prozo
 - Grazia Deledda: Nokte (trad. Carlo Minnaja)
 - Roberto Pérez-Franco: Tri rakontoj kaj poemo (Notoj pri Paradizo; En la akvoŝtupo; La cirko; La donaceto (trad. Norberto Diaz Guevara, reviziis Jorge Rafael Noguera kaj la aŭtoro)
 - Longos: Dafniso kaj Ĥloa. Dua libro (trad. Gerrit Berveling)
 - Iñaki Goitia Lucas: Kvar mikronoveloj (trad. Liven Dek)
- Tradukita poezio
 - Robindronath Tagor: La invento de la ŝuoj (trad. Probal Daŝgupto)
 - Krisztina Tóth: Orient-eŭropa triptiko (trad. Stela Besenyei-Merger)

- Zsuzsa Rakovszky: Decline and Fall (trad. István Ertl)
- Luofu: Du poemoj (Pro la vento; La funebro de poemo (trad. Ardo)
- Ronald Euler: Poemoj (Koko-Fric’; Kun malfermitaj okuloj; Panjo; Kune; Korbatado; Muelista vorto; La rideto de l’ patro; Por lasta fojo (trad. Benoît Philippe)
- Artikoloj kaj eseoj
 - Abel Montagut: Pri la eksterteranoj en Poemo de Utnoa kaj en ĝiaj - sciencfikciaj fontoj
 - Jesper Lykke Jacobsen: Pri la utilo krei grandegan korpuson de esperantaj revuoj
 - Ulrich Lins: Teruo Matsumoto –japano en Pollando. La escepta vivo de esperantista edzo
 - Gerrit Berveling: El mia vivo ĝis la 80-jariĝo
 - Lusin: Hazardaj pensojto (trad. Hu Shenghao)
 - Miguel Fernández: La vorto kaj la vento kaj ties eĥo en la nuntempa hispana literaturo
- Recenzoj
 - Valentin Melnikov: *Nordo. Amo* (de Mikaelo Bronŝtejn)
 - Emanuele Regano: *Kandido, aŭ Optimismo*, trad. Sergio Pokrovskij (de Voltero)
 - Federico Gobbo: *J.R.R. Tolkien the Esperantist. Before the arrival of Bilbo Baggins* (de Oronzo Cilli, Arden R. Smith kaj Patrick H. Wynne)
 - Antonio Valén: *Semo de matenruĝoj* (de Miguel Fernández)

5.4 *Esperantologio / Esperanto Studies*

5.5 *Investigationes Linguisticae*

6 NOVAĴLETEROJ

6.1 *Global coalition for language rights (GCLR)*

IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Klaus SCHUBERT
Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**